7-a JARO, N-o 363



LEIPZIG, 17. / 9. 1931

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS SEMAJNE | REDAKTEJO: 14, av. de Corbéra, Paris 12e. – GVIDANTO: E. Lanti. – SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. – ADMINISTREJO: R. Leĥner, Kolmstr. 1, Leipzig O 27 (Germanio). | APERAS SEMAJNE

Ĉu malsuperaj rasoj? Ne! Malsamaj civilizoj

Krom la politika ekonomio, neniu alia scienco verŝajne liveris pretekston al tiom tendencaj ĝeneraligoj kiel la psikologio pri la homaj specoj. Post la fama *Studo* pri la malegalo de l' rasoj de l'grafo Gobino (Gobineau), la pli malpli brilaj improvizaĵoj sinsekvis sennombre k tute freŝdate alia nobela persono, la grafo Kudenhof-Kalergi (Coudenhove-Kalergi), la ideologo de l'burĝa *Tut-Eŭropo*, skizis teorion pri la rasaj tipoj, laŭ kiu la eŭropaj nacioj estus karakterizataj per „heroa" sinteno, al kiu kontraŭstarus la „sankta" sinteno de la orientaj popoloj...

Tiuj ĉi malmaturaj konkludoj, kies sukceso estis ŝuldata al trafa literatura prezentado, ne formas la ekskluzivan propraĵon de l' politikistoj aŭ de l'sociologoj dotitaj per lirika temperamento. Kelkaj antropologoj, siavice, lasis sin kapti per trorapidaj simpligoj, metitaj en la servon de la rasaj antaŭjuĝoj. Tiel la vizaĝ-angulo de l'papuano aŭ la cerba pezo de l'negro atestis favore al la teorio pri homaj tiparoj malsuperaj.

Tiu ĉi teorio aŭ almenaŭ ĝia antropologia pravigo estas fervore atakitaj per aliaj esploroj. Antaŭ proksimume dudek jaroj Roberto Ŭudŭort (Woodworth) konstatis, ke la malsupero de l'meza pezo de la negra cerbo estis reprezentata per sensignifa nombro, kompare kun la konsiderinda disstaro de la varioj rimarkitaj ĉe la individuoj de la blanka raso. Kio permesis al li montri, ke ĉi tiu malsupero je pezo estis alkalkulenda al individuaj variadoj pli vere ol al aparta rasa karaktero.

Antropologiaj k neŭrologiaj studoj pli profundigitaj kondukis al analogaj rezultoj. Tamen, pelite tra la pordoj de la dissekcoĉambroj, la teorio pri malsuperaj rasoj reeniris brue tra la fenestroj de l'psikologiaj laboratorioj. Sin turnante al la metodo de l'mensaj testoj, ioma nombro da usonaj psikologoj provis enklasigi la rasojn k la popolojn laŭ ilia grado de intelekta kapablo. Kompreneble en tiu enklasigo la honorloko estis donata al la anglo-saksoj. Fergesn (Ferguson) asertis la malsuperon de l'negraj infanoj. Siavice Berto M. Leki (Lukey), atribuinte la unuan lokon al la usonanoj, rangigis sinsekve laŭ ordo de malpliiĝanta valoro la judojn, la hungarojn, la ĉeĥojn, la negrojn, la polojn k fine la italojn!



Dume kelkaj pli skrupulaj k precipe pli objektivaj esploroj malfirmigis ties rezultojn, sekvitaj kun evidenta partieco. Oni povis, ni menciu, konstati, ke la malsupero de l'alirasaj usonanoj en la psikologiaj eksperimentoj rezultis kelkfoje tute simple el la nesufiĉa scio de l'angla lingvo. Sed ĝi dependis ankaŭ de la sociaj influoj. Jam la profesoro Gart (Garth) ekkomprenis la gravon de tiuj ĉi faktoroj en la produkto-kvanto de l'personoj submetitaj al la mensaj provoj. Du aliaj usonaj psikologoj, Arlit (Arlitt) k Jang (Young), kiuj studis la negrajn, italajn k ĉinajn infanojn, fine konstatis, ke la diferencoj inter la junaj individuoj apartenantaj al sociaj medioj heterogenaj, estas multe pli gravaj ol oni konstatas inter la infanoj el diversaj nacioj.

Nu, tuj kiam oni elmontras la pli-influan rolon de l'sociaj faktoroj, la teorio pri malsuperaj rasoj renversiĝas. Por malkovri psikan malsuperon heredan „nekuraceblan", necesis serĉi ĝin en la mensaj funkcioj, kies denaskeco ne ŝajnas pridubebla. Nu bone, en la fako, cetere sufiĉe limigita, de l'psiko-fiziologiaj procezoj elementaj, la solaj, kiuj ŝajnas respondi al tiu ĉi postulo, oni neniam povis trovi indicojn precizajn pri tia malsupero. La malnovaj laboroj entenas eĉ multnombrajn informojn pri la sentuma supero de l'„sovaĝuloj". La pli novdataj atentaj esploradoj tendencas, kontraŭe, restarigi la psiko-fiziologian egalon de l'„blankuloj" k de la neblankhaŭtaj popoloj.

Konsekvence, la intelektaj diferencoj heredaj, se ili ekzistas, estas certe malatentindaj. Rilate al la diferencoj, kiujn oni senpene konstatas en la superaj mensaj funkcioj, en la maniero pensi, en la sentara vivo, en la maniero, kiel oni sin turnas al la rimedoj de la

memoro, pri tio oni devas serĉi la klarigon ne en la raso, sed en la historio, en la sociaj formoj.

Ni do ne povas paroli pri *rasoj* malsuperaj aŭ superaj, laŭ mensa vidpunkto, sed nur pri malsamaj *civilizoj*. Ĉi tiuj estas pli malpli progresintaj, pli malpli primitivaj; tio ne signifas, ke du kulturoj, kiuj diferencas, ĉiam devas esti *rangigitaj*. Cetere, inter la primitiva spiritostato k la civilizita spiritostato ne ekzistas vera malkontinuo. Ĝuste la malpravan malŝaton pri tiu ĉi fakto iuj psikologoj riproĉas al la tamen tiel fruktodona teorio de Levi-Bril (Lévy-Brühl). Efektive, ĉe la „primitivulo“, flanke de l'intelektaj manifestadoj, kiuj ŝokas nian kutimiĝon, trovas lokon praktikaj aŭ teknikaj aktivecoj, kiuj pruvas neneigeblan racian agmanieron. Aliparte, ĉe la civilizitoj, oni facile konstatas kelkajn „antaŭlogikajn“ agmanierojn. Estu permesate al mi citi kazon iom komikan, kiun mi povis mem observi. Antaŭ kelkaj monatoj mi ĉeestis publikan kunvenon de rusaj elmigrintoj. Kiel kutime mi estis profitinta el tio por studi la aŭskultantaron, unuigitan, eble, en la malamo al la sociaj k internaciistaj aspektoj de la revolucio, sed malgraŭ tio tre akre kontrastan. Ankaŭ la oratoroj ne ĉiuj estis interkonsentaj k kelkfoje polemikis vervege. Estis tie la „respublikan-demokrato“, kiu rekomendegis la starigon de reĝimo „popola k nacia“. Tie estis la ano de l' carismo tradiciista, kiu deziris la restariĝon de l'„nacia, granda k nedividebla Rusio“. La „naci-komunisto“ aklamis la revolucion rilate ĝian econ „nacian“. La lastmoda monarkisto predikis la interpaciĝon de l'dinastio kun la sovetoj „sur la nacia kampo“. Kion ajn oni pensu pri tio, ĉi tiuj paroladoj strangegaj, laŭ vidpunkto rigore racia, respondis al sistemoj de sufiĉe diferencaj, iafoje logike neinterpacigeblaj ideoj. La vorto *nacia*, kiu revenis ĉiumomente, estis uzata en sufiĉe variaj sencoj. Tamen, post kiam ĝi estis elparolita, ĉiuj aplaŭdis kun entuziasmo. La objektiva senco de l'frazoj, kiu aperigis ilian diferencecon, ne estis konsiderata. *Malgraŭ la kunteksto unu vorto sufiĉis por ekfunkciigi ĉiam la samajn afekciajn reagojn, por elvoki la samajn sentojn, kiuj forviŝis la logikan diferencon de l'paroladoj k de l'programoj k kiuj, se oni povas tiel diri, alproksimigis aŭ igis konsideri kiel identajn aferojn laŭ naturo tute diferencajn...* Ĉu tio ne estas ekzemplo frapanta pri la spiritostato afekcia, „antaŭ-logika“ aŭ „primitiva“? Oni povus facile plimultigi tiujn ĉi ekzemplojn, kiuj estas multnombraj eĉ en la kuranta vivo.

Tiu ĉi persistado de l'primitivaj formoj en la spiritostato de l'„eŭropanoj“ ne devas elvoki vian miron. Oni konsentos sendube al Levi-Bril, ke la primitiva animo estas la reflekto de aparta socia medio. Tamen ekzistas certe kerno da vero en la teorio de Turmvald (Thurmwald), kiu konsideras la „sovaĝulon“ kiel estaĵon multe malpli sociigitan ol la reprezentantojn de l'tielnomataj superaj kulturoj. Konsekvence ĉe la „sovaĝulo“ la psikaj heredaj donitaĵoj efikas pli forte. Sed tiuj ĉi donitaĵoj estas parto ankaŭ de nia hereda havaĵo, k kvankam ĉe ni ili estas profunde rearanĝitaj — sed ne subpremitaj — per longa kolektiva spertado, de tempo al tempo la antikvopsikaj, praulaj elementoj revenas al la supraĵo de nia spirita vivo. Kaj ni povas konsenti, ke tie ankoraŭ inter la „primitivulo“ k la „civilizito“ ne ekzistas netransirebla baro.

Eŭgeno Ŝrajder.

! GEK-DOJ! Se vi bezonas esperantajn librojn, lernolibrojn ktp., turnu vin NUR por havigi ilin al la ADMINISTRACIO DE SAT, Kolmstr. 1, Leipzig O. 27.

Georgo Bernardo Ŝa (Shaw) pri Rusio.

(Fino. Vd. n-ojn 361, 362.)

Tie ĉi[1] la spekulaciisto estas la homo, kiun vi admiras. Vi sendas lin por reprezenti vin en la Parlamentejo, vi sendas lin al la Domo de Nobeloj. Antaŭ kelkaj jaroj spekulacio komenciĝis, k samkiel iom post la fino de l' milito kelkaj erarigitaj homoj tie ĉi komencis kaŝe amasigi germanajn monbiletojn, tiel ankaŭ oni komencis kaŝe amasigi monon kontantan en Rusio, k la komercado estis preskaŭ paralizata pro la fakto, ke la mono malaperis. Oni tute facile pritraktis tion. Oni traserĉis proksimume mil homojn, kiujn oni havis kaŭzon por suspekti, k tiam oni mortpafis du el ili en ĉiu el la ĉefaj loĝantaraj centroj, k preskaŭ tuj en la sekvanta tago la mono reen ekfluis.

Memorante pri la raportoj, kiujn oni vidis, ke la intelektularo estas malpli bone prizorgata ol la proletaro, ke iliaj bezonoj estas atentataj nur post tiuj de la proletaro, mi interesiĝis renkonti verkistojn, kiuj aspektis pli prosperaj ol multaj, kiujn mi vidis tie ĉi, verkistojn, kiuj neniam eĉ provis pruntepreni monon de mi. Kaj mi diris al ili: „Sed vi estas la intelektularo.“ Ili respondis: „Ni ne estas la intelektularo, ni estas la intelekta proletaro.“

Kaj la kialo de tio, ke ni ne povas fari ion en tiu ĉi lando por la publiko, estas, ke ni havas parlamentan sistemon, kiu estas la fiero k la mirindaĵo de la kapitalista mondo, k kiu atingis tian gradon de grandega efiko, ke ĝi bezonas tridek jarojn por fari duonhoran taskon, kiom ajn urĝe necesan, ne gravas. En Rusio duonhora tasko devas esti plenumata dum duonhoro, nepre. Ne estas parlamento k nenia tia sensencaĵo. Estas instancoj, kiuj pridiskutas la estontan politikon, sed kiam tasko estas farota, ĝi estas farata ĉiam de diktatoro. Tio estas: iu devas fari ĝin laŭ propra respondeco. Se li eraras, li falas. Li scias, dum li havas la postenon, ke li devas liveri rezultojn, k se li ne tiel faros, li devos cedi sian lokon al iu, kiu kapablas. Neniu homo, fuŝinte taskon, povas diri: „Mi estas demokratece elektita, k nenio povas esti farata pri la afero.“ Estas nenia danĝero pri tio, ke Stalin elektos viron, kiu estas la plej aĝa filo de duko, aŭ ĉar li renkontis lin ĉe festeno la pasintan semajnon.

Tiu motivo estas for. Vi ne povas trovi ian alian motivon. Ili ne povas sin riĉigi, ili ne povas sin tenadi ĉe siaj postenoj krom per livero de rezultoj. Konsekvence estas nenia timo pri laŭklasa elekto, kiel ni tion havas tie ĉi. Kaj tio, kompreneble, estas kompleta renverso al nia sistemo. Tio, kion ni nomas demokratio, anstataŭ ol krei respondecsenton, absolute ĝin detruas, k la solaj personoj, kiuj ion faras, estas tiuj, kiuj havas la koruptan motivon sin riĉigi. Kaj kiam ni atingos socialismon tie ĉi, ni devos enkonduki tiun sistemon entute.

Mi volas diri vorton pri Lordino Astor. Ŝi diris, ke ili ne povas daŭri sen dio, k ke ili devos reveni al la religio. Estas nenia neceso, ke ili revenu al ĝi. Ili estas plenaj je ĝi. La Greka k Rusa Eklezioj estis senutilaj eklezioj. Homoj tie ĉi estas konsternitaj, kiam ili aŭdas, ke unu el la grandaj katedraloj estas ŝanĝita en kontraŭ-teologian muzeon, sed mi certigas vin, ke mi trapaŝis tiun muzeon, k mi volis, ke mi povu revoki Martinon Luter el la tombo. Aŭ grupon da kristanoj el Belfast. La tuta afero estas atako kontraŭ la pastreco. La pastroj prenis k prenis, k la popolo ricevis nenion rekompence.

Sed la ĉefaĵo estas, ke la tuta institucio estas necese religieca. Ĝi ne diras al la popolo: „Vi havos sufiĉon por manĝi k pli mallongan labortagon,“

[1] T. e. en Britio. — *Red.*

sed la homoj, kiuj gvidas ĝin, estas plenaj je pure spirita impulso. Senreligia homo ĉiam priatentas sin mem, prizorgas sian propran stomakon, priatentas tion, ke li havu plezurigan domon, en kiu loĝadi, homo, kiu ne sentas, ke lia sorto estas kunligita al la sorto de la komunumo ĉirkaŭ si. Homo, kiu estas religia, estas homo, kiu estas tedata pri si k volas fari la mondon pli bona. Kiu antaŭen rigardas al estonto pli bona ol la pasinto. Laboras por io pli grava k granda ol li mem. *Tio estas la esenco de la religio, labori por aferoj eksteraj al vi mem, k ĝi ne estas sinofero. Vi vivas multe pli abunde pro ĝi.*

Kio koncernas la Trian Internacion, mi sugestis, ke devas esti definitiva konflikto inter la Eklezio k la Ŝtato, en kiu la Ŝtato devas havi la venkon, k mi sugestis, ke la Tria Internacio eble ankoraŭ venus al serioza konflikto kun la Sovetia sistemo. Kaj mi kredas, ke mi rimarkis mienon sur la vizaĝoj de la homoj, kiujn mi alparolis, kiu pensigis, ke jam tia afero iom okazis, ke eble venus ia kondiĉaro, en kiu la Sovetia Ŝtato fariĝus la superegaĵo k la Tria Internacio devus okupi la duan lokon.

Trad. laŭ „La Nova Gvidanto" (The New Leader) 2978.

FAVORA OKAZO!

La kolekto da n-oj de „La Nova Epoko", kiuj entenas la

HISTORION DE LA LABORISTA ESPERANTA MOVADO

antaŭ la Mondmilito

verkitan de K-do G. P. de Bruin, (n-oj 4-9), estas ankoraŭ komplete havebla. Interesiĝantoj povas ricevi la tuton por la escepta prezo de nur

1 mk. germ.

ĉe Administrejo de SAT, Kolmstraße 1, Leipzig O. 27.

LA FONTO DE SENLABORECO (Fino. Vd. n-ojn 357/362.)

9.

Tamen, ĉu la ter-monopolo estas la *sola* kaŭzo de senlaboreco, precipe de l'nuna ega senlaboreco? Ne! Ekzistas ankaŭ aliaj kaŭzoj. Sed, tion ni devas ĉiam memori: *La decidiga kaŭzo estas la ter-monopolo.*

Ne ekzistas nur granda propraĵo de l'tero mem, sed same ekzistas ankaŭ granda propraĵo de valoroj, kiujn ĝi enhavas: fero, karbo, kupro k aliaj metaloj, kalio, uzeblaj akvaroj ktp. Esence, tio estas la sama monopolo, kia tiu super la tero; ĝi estas eĉ pli profitodona. Ankaŭ pri tio ni postulu:

Forigo de l'monopolo super valoroj de l'tero!

Speciala kaŭzo de l'nuna senlaboreco en Eŭropo estas la industriigo de l'kolonioj k ĝis nun importintaj landoj. Rusio malaperis kiel aĉetanto por industriaj varoj k baldaŭ ĝi disponos mem pri evoluinta industrio. Usono evoluis dum la mondmilito al eksportanta ŝtato; nun ĝi batalas akre pri merkatoj por siaj varoj, precipe kontraŭ Britio en Suda Ameriko k en Kanado. En Azio disvolviĝis ankaŭ ampleksa industrio, precipe teks-industrio; preskaŭ oni povas diri, ke la hinda, ĉina k japana kulio estas farinta sensalajra la teks-laboriston de Lenkeŝer (Lancashire).

„Sen la pligrandigo de l'entreprenoj en la transmaraj teritorioj, precipe en Ameriko (k tie ne nur en Usono), en Japanio, Ĉinio, Hindio, la eŭropaj teks-industrioj havus ankoraŭ nun sufiĉe da laboro, eĉ se oni malatentas la rusan merkaton." Tion diris la germana teks-industriisto *Miler-Erlinghaŭs.* Li konkludas el tiu *troproduktado* ankaŭ la krizon de l'merkato por krudmaterialoj. Sed, ni ja scias, ke ne ekzistas tro granda produktado, sed nur *tro malgranda konsumado.* La eŭropaj k usonaj laboristoj ne havas laboron k devas malsati, la aziaj kulioj malsatas eĉ, kiam ili havas laboron. Tial! Ĉu la laboristoj batalu unu kontraŭ la alia pro sia kvoto de l'malsatado? Ne, ili sin interligu, por kune batali kontraŭ siaj subpremantoj!

Kiel kaŭzo de l'nuna krizo estas citata plej ofte la tielnomata „*raciigo*". Esence, tio ne estas ĝusta.

Raciigo jam ĉiam ekzistis, t. e. plibonigo de l'metodoj por produktado, de l'maŝinoj, plimultigo de l'produktoj. Plej ofte samtempe estis pligrandigitaj ankaŭ la produktejoj. Per tio jam antaŭe ekestis krizoj. Sed tiuj krizoj estis forigitaj ĝenerale post mallonga tempo k tiam la produktado estis daŭrigita sur pligrandigita k pli fruktodona bazo. Tio estas komprenebla: Ĝenerale, la raciigo, la plibonigo de l'labor-metodoj, kaŭzas, ke la unuopa varo estas produktata pli malmultekoste. Kompreneble, la produktanto provas unue vendi la varon je la ĝisnuna prezo. Sed, en la kapitalista ordo la kapablo konsumi ne pligrandiĝas en sama grado kiel la kapablo produkti, precipe ĉe samtempa pligrandigo de l'produktejoj. Tial la provizaĵoj da varoj grandiĝas pli k pli; necesas limigi la produktadon, ekestas krizo pro „troproduktado". La kapitalisto devas malgrandigi la provizaĵon de varoj. Tion li povas nur malaltigante la prezon. La pli malmultekostan varon povas aĉeti pli multaj homoj k tiel okazas iom post iom ekvilibro inter konsumkapablo k pligrandigita produktado.

Tiel ĝis nun, skeme skizite, okazis la irado de l'krizoj. Sed nun la krizo ŝajnas preskaŭ daŭra fakto de l'ekonomia vivo. Tamen la granda raciigo de l'pasintaj jaroj ne estas la vera kaŭzo de l'nuna longdaŭra krizo. Ni vidis, ke la iamaj krizoj estis solvitaj per malpialtigo de l'prezoj. Tia solvo hodiaŭ ne estas ebla. Ĉar artefaritaj monopoloj, **prezmonopoloj**, malhelpas tion. Tio estas monopoloj, kiujn kreis unuopaj kapitalistoj aŭ grupoj da kapitalistoj per sia financa potenco, aŭ kiujn kaŭzis ŝtataj limimpostoj k aliaj ŝtataj rimedoj por ekonomio. Ilia esenco estas, ke la produktantoj povas dikti la prezojn de siaj produktoj, pli multekostajn prezojn ol ĉe senlimigita konkurenco.

Kelkaj grandaj kapitalistoj faris pli malpli dependaj de sia volo tutajn branĉojn k diktas nun la prezojn, kiujn devas pagi la aĉetanto. Sammaniere grupoj el produktantoj sin interligis por malebligi konkurencon k atingi pli altajn prezojn. Sed tiuj trustoj, karteloj k privataj konsentoj ne baziĝas firme sen ŝtata protekto. Ŝtataj rimedoj certigas la potencon de l'produktantoj kontraŭ la konsumantoj. La formoj de l'privataj k ŝtataj rimedoj estas tiom diversaj k tiom multspecaj, ke ne estas ebla, priskribi ilin detale.

Konata estas la monopolo de kelkaj grandaj kapitalistoj por petrolo, varo, kiu destinas la sorton de l'mondo pli forte ol ĉiuj paroladoj de l'politikistoj por la paco. Ekzistas ja eksterulo, Sovetio, kiu kaŭzis malaltigon de l'prezoj. Ankaŭ por aliaj fakoj ekzistas trustoj: la trusto por alumetoj, la trustoj de l'elektro-industrio, de l'ĥemio k.a. En ĉiuj ŝtatoj ni povas vidi tiajn monopolojn. Mi volas citi nur kelkajn el Germanio:

Mi jam menciis, ke parto de l'posedantoj de grandaj bienoj bankrotus pro ekonomiaj kaŭzoj sen la protekto per limimpostoj. Greno kostas en Germanio preskaŭ la trioblon de l'prezo sur la mond-merkato. Same la sukero; per enketo oni konstatis, ke la germana suker-industrio estas k estos ne kapabla konkurenci kontraŭ la kolonian produktadon; tamen ĝi vivas k donas profiton pro limimpostoj k aliaj ŝtataj rimedoj; la kostojn pagas la konsumanto. La germanaj mueliloj devas konsumi laŭ leĝa devigo enlandan grenon en difinita proporcio. La fero estas pli kara ol en eksterlando pro impostoj. La karb-minejoj estas kartelitaj per ŝtata devigo; krome ili estas

protektataj per doganoj k limigo de l'importo. Pro tiuj tro multekostaj materialoj estas plikostigata la produktado de l'aliaj varoj. Krome tiuj estas plikostigataj same per lim-impostoj. Per novaj lim-impostoj estas donacataj al la germanaj produktantoj de benzino 25 milionoj da mk.g. jare. Simila estas la afero ĉe papero, vitro, artefarita silko, ĥemiaĵoj k preskaŭ ĉiuj varoj. Kaj en aliaj ŝtatoj ni vidas la samon. Pro la reganta sistemo de karteloj „la benaĵoj de l'teknika progreso ne efikis pligrandigon de l'produktado k de l'eblo labori, sed servis nur por akiri monopolajn profitojn" konstatis germana ekonomiisto. Tiuj profitoj estas malŝparitaj por persona lukso k por novaj produktejoj, kiuj nun ne povas produkti pro manko de aĉetantoj; ĉar la granda plimulto de tiuj ja ne povas aĉeti sufiĉe pro la monopolaj prezoj k la aliaj kapitalistaj monopoloj.

La konkludo estas simpla: Por forigi la ekonomian krizon ni devas forigi la prez-monopolojn.

Forigo de l'prez-monopoloj

estas jam tasko por la nuna batalo de l'sindikatoj k laboristaj partioj. Malplialtigo k forigo de lim-impostoj, forigo de ŝtataj subvencioj k leĝaj rimedoj por protekto de nekapablaj entreprenistoj, tio estas postuloj realigeblaj parte jam sub la kapitalisma sistemo.

LITERATURO:
germanlingva:
„Francio, ekonomiaj kajeroj de l',Frankfurta Gazeto'."
„Novaj kajeroj por la socialismo" n-o 7, 1930. Potsdam.
Komparu: „ISK" n-o 12, decembro 1926; n-o 10, oktobro 1929; n-o 5, majo 1930.

10.

Ni do ekkonis: *La fundamenta kaŭzo de l'senlaboreco estas la ter-monopolo* inkluzive *la monopolo super la valoroj de l'tero*. Sur ili baziĝas la monopoloj de l'industriaj produktiloj k la financa monopolo. Kiel plian kaŭzon de l'nuna senlaboreco ni ekkonis la *prez-monopolojn*, kiuj baziĝas ankaŭ sur la ter-monopolo.

Kontraŭ tiuj monopoloj sin turnu la batalo de l'laboristaro por ĝia ekonomia liberiĝo. Por tia batalo agitas sisteme ĝis nun nur la ankoraŭ malgranda partio „Internacio de socialista kunbatalo" (ISK). La sindikatoj same kiel la grandaj partioj laboristaj batalas kontraŭ la senlaboreco ne havante difinitan celon; pro tio ili scias ĝis nun nur solvojn diktitajn de embaraso aŭ solvojn, kiuj ne povas forigi la senlaborecon definitive.

Unuavide ŝajnas ja stulte atendi la forigon de l'„industria" rezervarmeo esence per agrarpolitika rimedo. Sed ni ja vidis, ke la rezerv-armeo nur laŭŝajne estas „industria", efektive ĝi estas kampara. Pro tio ni ekkonis, ke nur agrarpolitika rimedo povos forigi la veran kaŭzon de l'senlaboreco. Tiu agrarpolitika rimedo estas ankaŭ la kondiĉo por firma ligo inter laboristoj k kamparanoj, ligo, kiun malhelpis ĝis nun la programoj de l'laboristaj partioj. Sed nur per ligo inter laboristoj k kamparanoj estas ebla sukcesa revolucio. En Rusio, *Lenin* kreis tian ligon prokrastante siajn kolektivajn postulojn. Nia ekkono ebligas al ni fari ligon kun la subpremataj kamparanoj el ĉiuj landoj sen iaj kondiĉoj. Ĉar la revolucia batalo ne estas nur batalo de unuopa popolo. Ni ja vidis, ke ĝi necesas, ke ĝi furiozas ĉie en la mondo, en Eŭropo kiel en Azio, en Afriko kiel en Ameriko. Estas batalo de l'subprematoj ĉiulandaj kontraŭ iliaj subpremantoj, batalo, kiun ni faru ne influataj de naciaj antaŭjuĝoj por pli bona estonto de l'laboristaro k de l'tuta homaro.

Vetig (16900), Gelnhaŭsen (Germ.).

Du facilajn teatraĵojn
(La Lignovermo, La Versaja Kaptito),
parolĥorojn k versojn speciale taŭgajn
por deklamo vi trovas en 64-paĝa libro
NIA TEATRO
Eldono de SAT. *Prezo 0.60 mk. g.*
Administracio de SAT, Leipzig O. 27.

La klasbatalo tra la mondo

La evoluo de l'fervojistaj sindikatoj en Hispanio.

La starigo de l'respubliko alportis al la Fervojista sindikato hispania pli grandan agliberon, el kiu ĝi nuntempe profitas por kolekti la fruktojn de multjaraj klopodoj. La kongreso de Salamanko submetis al la registaro ok depostulojn, el kiuj kvin nuntempe estas plenumitaj, nome: la enkonduko de l'okhora labortago, la retiro de l' militpersonoj el la fervoja servo, la redungo de l'aktivuloj, kiuj estis maldungitaj pro strikagoj, la pliigo de l' nombro da reprezentantoj el la dungitaro en la Supera Fervoja Konsilantaro k la nov-organizado de l'„egalpartaj komisionoj". Tiuj sukcesoj sekvigis la kreskon de l'sindikatanaro de 22000 (en januaro 1930) al pli ol 40000 nuntempe. En la jaro 1924 la sindikato pagis kotizojn por apenaŭ 660 anoj al la I.T.F. (Intern.Transportlab.Federacio). *P. P.*

Usona Taglibro.

Aŭg. 1931. — Multe kontrastas la aferoj nun ĉi tie kompare al la j. 1928, kiam mi komencis verki taglibron. Tiam la kapitalistoj plenkonfide fanfaronis pri „senkriza kapitalismo"; nun Usono frontas malesperigan vintron. Tiam altaj salajroj por kvalifikitaj metiistoj; nun reduktoj, unu post la alia, malpliigis la salajrojn. Grandskala senlaboreco k laboristoj, kiuj devas almozpeti en la stratoj. Farmistoj, kiuj devas vendi grenon je subnormala prezo (25 cendoj por buŝelo[1]). La teksa k karbmina industrioj, neniam partoprenintaj la „prosperon", speciale suferis k strikoj okazis. Spite heroa batalado la strikintoj estis venkitaj, ĉar la policanoj k la armitaj gardistoj de l'kapitalistoj elĵetis ilin el iliaj hejmoj, enkarcerigis k pafmortigis. (Samtempe Huver savis Eŭropon per moratorio[2], ĉar la usona bankistaro timis la rezulton de malsato en Germanio!)

Ankoraŭ Muni k Bilings putras en malliberejo en Kalifornio spite la reviviĝo de protestoj. En suda ŝtato de Alabama 7 negraj junuloj kuŝas sub la ombro de elektromortigo, ĉar laŭ falsa akuzo ili atakis du blankajn knabinojn.

Plensignife, elmigrado nun pli granda estas ol enmigrado. En diversaj strikoj la „oficiala fako" forŝipigis ĉiun strikanton, kiu ne fariĝis usona civitano. La Amerika Federacio de Laboro vane protestis kontraŭ la salajro-malpliigo, sed plejparte diskutas pri la bataloj inter la diversaj metiaj sindikatoj. Ĝi ankoraŭ kontraŭstaras ŝtatan asekuron kontraŭ la senlaboreco. Bedaŭrinde mankas unueco k rapida kresko inter la pli radikalaj partioj.

Speciale en Nov-Jorko malkovriĝis multaj skandaloj pri la fabrikado de krimoj (policano ekz. kondukas virinon al domo k poste postulas monon de la virino k la dommastrino, kiuj donas ĝin por eviti proceson pro bordelo). Oni povas aĉeti la verdikton en la juĝejo. Ŝajne en la plej oportuna k riĉa lando en la mondo, la kapitalismo bankrotas. *488 (Brukŭud).*

[1] Buŝelo = 36,5 litroj.
[2] Pagprokrasto.

Makdonald ne havas tempon por la socialismo.

Dum julio okazis en Vieno kongreso de la Socialista Internacio, k la soc. dem. gazetaro antaŭe multon skribis, ke jam en 1914 estus okazinta kongreso en tiu ĉi urbo, sed la militdeklaro malebligis tion. Anstataŭ kune al la kongreso, la delegitoj kiel „malamikoj" iris en la tranĉeojn. La gazetaro skribis, ke depost tiam la mondo aliiĝis k nun venos la socialistoj el diversaj landoj, kie ili kelkloke eĉ akiris postenojn, kiel tiujn de ministroj, altrangaj ŝtatoficistoj ktp.

Oni ankaŭ anoncis la partoprenon de la angla ministroprezidanto Makdonald. La kongreso komenciĝis k daŭr-

is unu semajnon — Makdonald ne venis. Li tiutempe vojaĝis tra tuta Eŭropo k konferencis kun registaroj por fliki la de pereo minacatan kapitalisman sistemon. Dum la kongreso li eĉ estis sufiĉe proksima, en Berlino, sed vane oni atendis lin. Li eĉ ne sendis salutojn, — li havis aliajn zorgojn. Estas ja pli grave, serĉi rimedojn por eviti komplikaĵojn en la nuna sociordo...

En 1914 almenaŭ militeksplodo malhelpis la delegitojn, viziti la socialistan kongreson. 17 jarojn poste Makdonald estas jam malhelpata de la krizo de l'kapitalismo. *Vienano.*

Ĝojiga fakto de solidaro.

En la unua aŭgust-semajno vizitis Nederlandon 40 anglaj kontraŭmilitistoj. Ili estis akceptataj de la estraroj de diversaj kontraŭmilitistaj unuiĝoj en Nederlando. La grupo konsistis grandparte el laboristoj k estis gvidata de l'sekretario Vil Rom (Wil Rome) k parlamentano Vilfredo Ŭelok (Wilfred Wellock). Ne estis ilia nura celo ĝui feriojn; samtempe ili volis evidentigi sian simpation por k sian kunvivadon kun la nederlandaj militservo-rifuzantoj. La 3-an de aŭg. ili vizitis la specialan pundomon k havis interparolon kun ties direktoro. Kvankam la grupo jam kunportis 120 guldenojn (ĉ. 45 dolaroj) por subteno al la malliberigitoj, ili decidis ankoraŭ, sub la impreso de la malliberejo, kolekti sumon por helpi la rifuzantojn. La rezulto estis, ke en adiaŭa vespero ankoraŭ 170 guldenoj estis donataj. Certe belega pruvo de solidaro! K-do Ŭelok prezentis dokumenton al la nederlandaj militservo-rifuzantoj, kiu estas subskribita de diversaj anglaj parlamentanoj k a. eminentaj personoj k kiu tekstas jene: „Ni sendas saluton al ĉiuj per malliberigo punitaj militservo-rifuzantoj en Nederlando, certigante al ili, ke ilia faro estas seninterrompa fonto de ĝojigo k kuraĝigo por la batalantoj por internacia paco en Granda Britio.“ Ĉi tiu dokumento estas pruvo, ke la pensmaniero pri militserva rifuzado pli k pli penetras en la socian vivon.

Bout (15 396).

Senlaborulaj manifestacioj en Italio.

La ekonomia krizo plue furiozadas, precipe en Suda Italio. La prezo por brutaro falis tre malalten. La bovoj, kiuj estis vendataj antaŭ du jaroj por 2000 k 2500 liroj, hodiaŭ estas ofertataj por 800 liroj. Porkidoj, kiuj valoris antaŭ 6 monatoj 30 lirojn, estas vendataj hodiaŭ por 5 liroj. Dume la prezo ĉe la etkomercistoj k en la foiroj restas la sama. Multaj terkulturaj etposedantoj estas devigataj vendi sian brutaron por pagi la impostojn.

En Aleksandrio la senlaboruloj manifestaciis kriante: „For la faŝismon!“ Ili deklaris, ke ili deziris esti arestataj por povi manĝi la malliberejan supon. La virinoj manifestaciis antaŭ la prefektejo, postulante senlaborulan subvencion. Policanaro dispelis ilin. La policaj persekutoj plinombriĝas sekve de la danĝera situacio. Sekretaj propagandfolioj estas timegataj.

Laŭ „Italia“.

Malbona situacio de la ŝipistoj en la internacia Rejna navigado.

La situacio de la ŝipistoj en la internacia Rejna navigado ĉiam pli malboniĝas. La germanaj entreprenistoj malaltigis dufoje la salajrojn je sume 15—17%; la francaj firmoj ankaŭ malaltigis la salajrojn je 12—15%; en Belgio ne ekzistas kolektivkontrakto k ankaŭ tie estis la salajroj dufoje malaltigataj je sume 16%; la entreprenistoj en la svisa Rejna navigado postulis malaltigon de la salajroj je 30% k dank' al 48-hora striko de la personaro la salajroj estis malaltigataj „nur“ je 9—10%; k en Holando klopodas la entreprenistoj same malaltigi la salajrojn. *Oni vidas, kiel* unuanimaj estas la *diversnaciaj* kapitalistoj, se temas kontraŭagi la interesojn de l'laboristaro.

Laŭ ITF-Gazetservo (n-o 8).

Ĉiu konscia SAT-ano portas la sennaciecan insignon, ne la nacian. Oni ja ne lernas esperanton por interrilati kun samlandanoj. Mendu la SAT-insignon ĉe la Administracio en Leipzig O 27.

DISKUTEJO:

Ĉu la Gek-doj ŝatas maldecaĵojn?

Mi treege miris, ke troviĝas revoluciuloj, kiuj ne jam liberiĝis el la religiaj miasmoj. Mi aludas al la artikolo „Ĉu la Gek-doj ŝatas maldecaĵojn?“ aperinta en „S-ulo“ n-o 349. Male, mi devas esti tre dankema al la aŭtoro de l'artikolo pri la onanado, antaŭ nelonge aperinta en „S-ulo“, kiu celtrafe tuŝis gravegan problemon de la hodiaŭa mondo. Mi eĉ kuraĝas diri, ke unu el la plej fortaj sklavigiloj posedataj de la kapitalista klaso estas tiu rilatanta al la seksa problemo. Homoj, kiuj sentas sin posedataj de malbonaj k kriminalaj instinktoj, ne povas esti tiel revoluciaj kiel tiuj, kiuj konscias, ke la normala seksa rilato estas bela afero de la naturo, aŭ pli bone, de la plej alta civilizo, ĉar nur nun komencas la mondo forskui de si la religian sintenon al la seksa rilato k instinkto. La plej aŭtoritataj scienculoj nun asertas, ke la seksa problemo ne povas esti traktata de la morala aŭ religia vidpunkto, sed nur de scienca aŭ objektiva, klinika starpunkto.

Al la religiuloj k eklezioj devas esti ŝuldataj la teruraj seksaj (veneraj) malsanoj k la prostituo; ĉar ili per sia konduto detenis k detenas la plej multajn popolojn de la scienca scio pri seksaj aferoj k seksaj malsanoj. Pro tio miloj da homoj premegitaj en nescion trovis sin neeviteble infektitaj de la teruraj veneraj malsanoj. Pro la

Pri la drako-festotago en Ĉinio.

Je la 4-a tago de la 5-a lunmonato laŭ la ĉina malnova kalendaro okazas la Drako-festotago. Grava ĝi estas, egala al mez-aŭtuno: la 16-a tago de la 8-a lunmonato. Ĝis nun ĝi ankoraŭ forte influas la popolon, malgraŭ ke la registaro intencas nuligi la lunkalendaron. Ĝi estas unu el la tri t.n. „financtagoj“ de la jaro; la aliaj estas mez-aŭtuno k jarfino. La bonfamaj firmoj k personoj ĉiam likvidas en tiu tempo siajn ŝuldojn, aliel oni ilin rigardos kiel plej malfidindajn. Plej multaj en tiu festotago ĉesas labori k festas. Ĉiuj laborejoj k firmoj manĝigas siajn dungitojn per plej delikataj manĝaĵoj, k ankaŭ drinkigas ilin.

Kiel dum la Novjara tago, la homoj intergratulas sin per poŝtkarto aŭ nur buŝe, ili ricevas k dissendas donacojn, donas trinkmonan rekompencon al siaj geservistoj, vizitas la familiojn parencajn k siajn amikojn, k ankaŭ ne forgesas la teatron k kinejon. Feliĉaj estas la knaboj, nove vestitaj, kiuj ricevas dolĉaĵojn de siaj gepatroj. Kaj oni rigore malpermesas eldiri ion nedecan k malfeliĉigan.

Specialan frandaĵon oni preparas, nomatan „Ĉunc“, — estas rizo pakita per bambua folio, tre ŝatata manĝaĵo. Krome la homoj trinkas alkoholaĵon miksitan kun medicina pulvoro.

La plej pompa okazaĵo estas drakboata konkurado; boatoj kun drakaj kapoj k vostoj, belege ornamitaj, konkuras unu la alian sur la akvo. Ĉiam amasiĝas miloj da homoj, kiam tiu spektaklo okazas. Sed nun tia pompaĵo malofte estas farata, ĉar la registaro ne donas permeson por tiu aranĝo. Pri tiu memorinda festotago ankaŭ ne mankas legendoj, unu el kiuj estas „Blanka serpentulino“, bela romano, tre populara. Dum tiu ĉi tago ĉiuj teatroj prezentas ĉi-rilatan dramon, k neniam estas ĝenataj la spektakloj.

Kvankam tiu ĉi festotago konservis gravan signifon por la plenaĝuloj, la juna generacio jam delonge sentas plenan indiferenton al ĝi. La junuloj havas siajn proprajn festotagojn, kiel ekzemple la Unuan de Majo, 30-an de majo (en 1925 la anglaj imperiistoj buĉis ĉinajn studentojn k laboristojn per maŝinpafiloj en Ŝanĥajo en tiu tago) k „duobla deko“-n (deka de oktobro, la fondotago de l'Ĉina respubliko).

F. B. (en „Nia Espero“ de Hanko [Ĉinio] julio 1931).

moralo k la religio la reformemuloj kaŝis la veron k mensogis terure.

Nu, la modernuloj trovas, ke la plej bona afero estas — feliĉo, k mi kuraĝas diri, ke feliĉo plejparte baziĝas sur plezuro. Ne estas plezuro la kaŭzo de la malbono aŭ la malsano, sed nur ĝia misuzo k erar-uzo. La samo rilatas al la seksa plezuro; nur la nescio pri ĝi kaŭzas tiom da domaĝo. Ni havu la kuraĝon ĵeti lumon sur ĉi tiun demandon. *8207 (Denver, Kolorado).*

*

Ankoraŭ unu el la sama peka regiono kuraĝas diri kelkion. Kio decas? Laŭ mi tio, ke oni pritraktu en nia gazeto ĉion per senkaŝa maniero, kiel decas inter sinceraj Gek-doj, k oni ne taksu sin pli supera ol iuj K-doj nenormaluloj. Kaŝado de plej naturaj homkorpaj funkcioj kondukas al hipokrito, sekve de kio oni emas identigi ilin kun plej porkaĉaj aferoj. Certe ĉiu el ni konsentas, ke oni danĝerulojn izolu, sed se eble du samseksuloj sin amas, neniu havas la rajton ekscitiĝi. Do entute, reakcia spirito estu for el nia gazeto. *Knaŭft (17 264) — 24-jara.*

*

La paĝoj de „S-ulo" longtempe polemike raportis pri deco k maldeco laŭ la koncepto de diversaj Gek-doj k mi simple demandus al la plejaj gedeculoj, kiom el ili konsentus, ke *ĉiuj* iliaj privataj scenoj estu filme prezentataj al la publiko. Certe ĉiuj rifuzus k tio sufiĉas por pruvi, ke ne ekzistas decaj nek maldecaj homoj sur nia planedo. Mi estas konvinkita, ke *ĉiuj* praktikas la maldecon laŭ bezono, neceso, gusto, kaprico aŭ kutimo. La diferenco konsistas nur en la sistemo, laŭ kiu oni ĝin praktikas. Se kelkfoje en la sama sistemo troviĝas ankaŭ diferenco, tio dependas simple de aplikataj dozoj. Unuj preferas pioniri, aliaj nur kopii post trafingraj rigardoj, k entute pure decaj homoj tute ne ekzistas por mi. Oni nomas decaj la konatajn agojn, kiuj konformiĝas kun la aktuala oficiala moralo, k maldecaj la nekonatajn; tial la rutinemaj homoj kritikas la duan kategorion ĝis ĝia oficialigo, sed rezervas por si la rajton ĝin praktiki private.

Sekve la gedeculoj agus multe pli dece, se ili ankaŭ rezervus por si k por ĉiuj la rajton al respekto. Per insultoj oni nur detruas, sed per konsultoj oni ĉiam konstruas. Do, ni konstruu novan moralon komparante niajn opiniojn reciproke k senofende, ĉar se eblus esplori la intimajn detalojn de la ofendantoj, oni multe pli ofendiĝus. La hipokrita vualo estas tiom delikata, ke nur rigardo de blindulo sufiĉas por ĝin deŝiri. Tial mi konsilas, ke oni ne tro fanfaronu pri sia „deco". *Soares.*

SAT-anoj!
En viaj korespondaĵoj al la Administrejo ĉiam citu vian membro-numeron

Al R. Kiles (13661) en „S-ulo" n-o 359.

Vi pensas, ke nur burĝino estas kapabla je amdisiĝo pro klasdiferencoj. Ne, tio sama okazas, plejparte, kun proletidino. Ŝi nepre preferas riĉulonburĝon. Nur post fiasko ŝi pripensas k ne ĉiam pro amo kontentiĝas per viro-laboristo. Difino: Virino kiel estonta patrino ĉiam emas al riĉo, k tio estas tute natura, kvazaŭ pli forta zorgo pri estonta generacio. Se al virino trafas du egalriĉaj viroj, ŝi preferas tiuokaze la elekton laŭ pli plaĉaj ecoj. Kio estas amo? Amo estas emo al la estonta generacio. Kio estas amprefero? Amprefero estas koincido de naturaj ecoj, ĉar geviroj ĉiam ŝatas vidi ĉe sia kunulo tiujn ecojn, kiujn ili mem ne havas. Tio estas natura elekto.

Solvo: Do, se vi, K-do, estus aŭ fariĝus preskaŭ egalriĉa kiel via amatino k klera en sama kulturo, k la natura elekto estus bonŝanca, vi havigus ŝin al vi. *Latviano.*

AJNŜTAJN (EINSTEIN) PRI LA PROBLEMO DE L'PACO

La mondkonata prof. Ajnŝtajn, kiu estis la honora prezidanto de la IIIa SAT-Kongreso en Kasel (1923), eldiris la ĉi-suban paroladon ĉe la kongreso de l'Societo pri historio en Nov-Jorko. La samajn pensojn ni trovas en letero, kiun sendis Alb. Ajnŝtajn al la Konferenco de la Internacio de Militrezistantoj, kiu okazis en Ljono (Lyon) de 1-a ĝis 4-a de aŭgusto 1931. En tiu letero li alvokas ĉiujn gevirojn, eminentajn k neeminentajn, deklari antaŭ ol kunvenos la tutmonda malarmada konferenco en Ĝenevo (februaro), ke ili rifuzos doni ian helpon al milito aŭ militpreparo en la estonto. „Ili diru tion skribe al sia registaro — skribas Ajnŝtajn —" k enregistru tian decidon per skribo al mi dirante, ke ili tion faris. Mi atendas ricevi milojn da respondoj al ĉi tiu alvoko. Ili devas esti adresitaj al mi ĉe Ĉefoficejo de „War Resisters' International", 11, Abbay Road, Enfield, Middlesex (Angl.). Donacojn por la „Einsteina Kaso de Internacio de Kontraŭmilitistoj" oni sendu al sama adreso."

Estas afliktege, ke ĉiuj, kiuj principe deklaras sin por pacismo, kiam ili kunvenas, restas ĉiam ekskluzive inter si. Ili estas tiel enfermitaj same kiel ŝafoj en gardejo, dum la lupoj spioniras ĉirkaŭ ili. La blekado de tiuj ĉi ŝafoj pacistaj aŭdiĝas nur inter ili; neniu ekster la grego ilin aŭdas. Tiel ilia voko restas komplete senefika. Tia estas la malĝojiga fatalo, kiu malutilas al ĉiu pacista movado.

La pacistoj devus manifesti sian ĉeeston en efektiva k aktiva maniero. La agado estas nepre necesa. La vortoj solaj ne progresigos la demandon. La pacistoj devas komenci senprokraste intensan agadon.

En nia nuna organizo, regata de l' militservo, ĉiuj homoj estas devigataj fari krimojn, — la krimon de l'mortigo, — servante sian landon.

Ĉiuj pacistoj devas havi unu celon: konvinki la popolojn, ke la milito estas la plejo de l'malmoraleco, k liberigi la mondon de tiu ĉi senhonta sklaveco, kia estas la militservo.



Kanonnutraĵo.

Mi volus sugesti du vojojn por atingi tiun ĉi celon. La unua estas jam sekvita: estas la nefleksebla rezisto al la milito, estas la rifuzo de l'militservo en ajna cirkonstanco. En la landoj, kie regas la deviga servo, la veraj pacistoj devas rifuzi la militservon. En multaj landoj, multnombraj individuoj rifuzis k rifuzas militservi en pactempo. Kaj deklarante tiel, ke ili militos neniaokaze, en milita tempo, ili ne hezitas doni la grandegan oferon de sia persona intereso.

En la landoj, kie la deviga servo ne ekzistas, la veraj pacistoj devas deklari publike, jam en paca tempo, ke en nenia cirkonstanco ili portos armilojn. Tiel ili povas manifesti sian reziston al la milito.

Se kelkiuj inter vi dubas, ke tiuj ĉi manifestantoj de l'rezistado povas alveni al efika rezulto, lasu min diri al vi, ke, se 2% sole el la tuta nombro da mobilizeblaj homoj en iu lando sin deklarus rifuzantoj, la registaroj restus nepovaj k ne eblus enkarcerigi tian amason da individuoj.

Ekzistas alia agrimedo por la *militrifuzantoj*. Estas malpli eksterleĝa rimedo, kiun mi volas al vi proponi.

La pacistoj devus krei sufiĉe potencan opini-movadon, por rezultigi la starigon de nova internacia leĝaro, entenanta la *rajton* rifuzi la milit-

servon en pactempo. Tiu ĉi leĝo estos kompletigata per artikolo deviganta ĉiun individuon, kiu rifuzas la militservon, al plenumo de metio aŭ laboro tre malfacila k eĉ danĝera, anstataŭanta la militservon. Tiel la militrifuzantoj pruvos, ke ili ne agas pro egoismo sed nur por esti konsekvencaj kun sia propra kredo, por elmontri, ke la internaciaj konfliktoj povas esti reguligataj per aliaj rimedoj ol per bataloj. Se la „militrifuzantoj" devigas sin al penigaj k riskaj laboroj je favoro de sia patrio aŭ pli ĝenerale de l'homaro anstataŭ plenumi sian militservon, ili ne plu povos esti akuzataj pri malkuraĝo, nek pri egoismo.

Mi pensas, ke la Ligo de Nacioj povos esti instigata starigi tiun ĉi internacian leĝaron, rilatan al la militserva rifuzo en pactempo.

La pacistoj ĉiulandaj devos organiziĝi por kolekti la sumojn necesajn por helpi, k helpi materie, al la militservorifuzantoj.

Mi pledas por internacia organizo de „militrifuzantoj", por komuna internacia monfondo destinita ilin subteni.

Mi esperas, ke vi bonvolos konsideri tiun ĉi ideon sen antaŭjuĝo, ĝin diskutadi en viaj estontaj kunvenoj k kontribui k labori por praktike realigi ĝin. Se la iniciatoj de l'pacistoj estus sufiĉe multaj, se la „militrifuzantoj" agus kun kuraĝo k konfido al sia afero, ili ne povus fine ne esti komprenataj k, de la momento, kiam ili estus komprenataj, ilia penado fariĝus efika.

Ekster la rimedoj, kiujn mi ĵus konsideras, ili povos nur vane perdi sian tempon k perei senutile. Se ili ne agas, sekvante la vojojn, kiujn mi al vi sugestas, ili restos simple ŝafoj, ŝafblekantaj pacistoj.

Alberto Ajnŝtajn.

POR NIA MEDITO.

La evoluo plirapidiĝas.

La homa penso spertis en malpli ol unu centjaro pli da aliiĝoj ol dum la ok mil antaŭaj jaroj da historio. Se oni juĝas laŭ la jam efektivigitaj konkeroj, la nekonata zono en kiun la scienco penetras iom pli ĉiutage, malkovras al ni misterojn, pri kiuj oni jam hodiaŭ havas eblon ekvideti ties grandon.

Ni do povas revi pri estonta homaro tiom malsama de la nuna homaro, kiom ĉi tiu lasta malsamas de la primitivaj estuloj el la prahistorio. Tio sendube estas revo, sed ĝi estas tamen pli verŝajna ol tiuj, kiuj superregis la mondon ĝis nun k pri kiuj ni ne devas malbone paroli, ĉar ili altigis la homon el barbareco ĝis civilizeco.

Gustavo Lebon.

TRA ESPERANTIO

Ĉe la XI-a Kongreso de SAT.

Transportlaborista kunveno.

Okaze de la SAT-kongreso estis aranĝita ankaŭ speciala fakkunsido de esp-istaj transportlaboristoj, kiun partoprenis 15 K-doj el 6 landoj. I.T.F. (Intern. Transportlab. Federacio) estis reprezentata de K-doj *Nathans* k *Klatil*. La diverslandaj K-doj raportis pri la stato de l'esp.movado inter transportlaboristoj. Ĝenerale oni konstatis progresojn, kvankam en kelkaj landoj devas esti venkataj multaj malfaciloj. Precipe notinda estas la progreso en Svedio, kie la transportlab.sindikatoj favoras esp-on k per ĉiuj rimedoj subtenas ĝin. K-do Klatil poste parolis pri la plano de ITF organizi la esp. transport- k trafiklaboristaron en sia kadro. La plano estis unuanime aprobita de ĉiuj ĉeestantoj k ĉiuj promesis kunlabori laŭ siaj fortoj. Oni decidis sendi al la sekretariejo de ITF ĉiujn disponeblajn adresojn de esp-istaj ITF-anoj. Tiam oni priparolis la okazontan konferencon de esp.transportlaboristoj dum la kongreso de ITF en Prago (1932) k aranĝotan ekspozicion. La 5-an de aŭgusto la kunvenintoj vizitis la ITF-oficejojn (jam la trian fojon okazas, ke transportlaboristoj vizitas la oficejojn de sia organizo, k ĉiufoje ili estis — esp-istoj!).

Laŭ ITF-Komunikoj, n-o 7.

Kunveno de la Socialista Frakcio el SAT- k LEA-anoj.

La kunvenon partoprenis 85 Gek-doj el proks. 8 landoj. Prezidis K-do Eriksson (Svedio), protokolis K-dino Klatil (Amsterdam). La ĉeestantoj pridiskutis vigle la nunan staton de la SAT-movado, la taskojn de la Frakcio k ĝiajn estontajn laborojn. Kelkaj Gek-doj raportis pri siaj spertoj en la unuopaj landoj, pri sukcesoj k nesukcesoj de esp-o ĉe partiaj instancoj. K-do Jonas (Vieno), sekretario, raportis skribe, ke al la Frakcio en julio 1931 apartenas 974 Gek-doj el 18 landoj. (nuntempe jam pli ol 1000 — *Sekr.*). La kasostato estas iom kontentiga, sed kompreneble tute ne sufiĉas por entrepreni iom rimarkindan. Malgraŭ tio, la kunveno ankoraŭ ne taksis la tempon taŭga por enkonduko de kotizo. La gazetservanto, K-do Grimme (Vieno) k K-dino van Essen (Nederl.), por virina fako, raportis pri siaj laboroj k instigis al pli vigla laboro por la estonto. — Laŭ propono de K-do Alings (Amsterdam), la estraro de la Frakcio estas komisiita pristudi la organizan problemon de SAT k de la Frakcio k transdoni al la venonta kongreso de SAT eventualajn tiurilatajn proponojn. (La estraro en tiu direkto jam eklaboris. — *Sekr.*). Krome la kunveno decidis nuntempe resti fidela al SAT, vigle propagandi en socialistaj rondoj por SAT k ĉiurilate kunlabori. Al la sekretariejo estis komisiita prezenti al la venonta kunveno de la Frakcio klarajn raportojn pri la movado en la unuopaj landoj. La novelektoj havis jenan rezulton: Prez.: F. Azorin, Hispanio; Sekret.: E. F. Klatil, Vieno-Amsterdam; Virina fako: M. van Essen, Nederl.; Gazetservo: L. Grimme, Aŭstrio; Kromaj estraranoj: H. W. Alings, Nederl.; K. Deubler, Germ. — En la lasta cirkulero de l'Frakcio, kiu aperas komence de septembro, la Frakcio alvokas ĉiujn socialistajn esp-istojn al fervora kunlaboro, ĉefe laŭ jenaj gvidlinioj: 1) Varbi por SAT k kunlabori ĉe „S-ulo"; 2) Enpenetri ĉiujn socialistajn organizojn per propagando por esp-o; 3) Alsendi SAT-n-on al la sekretariejo, por ke la nomoj de la socialistoj en la SAT-jarlibro ricevu la signon *S*; 4) Alsendi al la sekretariejo ĉiujn decidojn, rezoluciojn, sukcesojn, artikolojn ktp. pri- k poresp-ajn, ĉe socialistaj organizoj k instancoj, sindikatoj, k.s.; 5) subteni la Frakcion — eĉ la plej malgranda monsumo povas servi al la celo.

Ĉiuj socialistaj esp-istoj anoncu sin ankoraŭ hodiaŭ al la sekretariejo de la Frakcio, K-dino Ernjo F. Klatil, *Amsterdam Z*, Hectorstraat 4. I.

Ili mokas pri si mem.

Kiel konate, la opozicio atakas la SAT-Direkcion ankaŭ pro la eldonita „Plena Vortaro", kiu laŭ aserto de ortodoksuloj estas nesufiĉe — proleta. (Oni furiozas pri la kunlaborado de neŭtralaj lingvistoj je la vortaro, sed aliflanke la opozicia gvidanto ja kunlaboras burĝajn gazetojn.)

Ni povus opinii, ke la opoziciuloj, obeante la dirojn de siaj estroj, *ignoras* tiun vortaron (Cetere estas rekomendite al ili, bojkoti ĉiujn SAT-eldonaĵojn.) Sed, vidu „Isto"-n n-o 17; ĝi enhavas du anoncojn de K-doj, kiuj petas pri ricevo de la SAT-vortaro. Strange, tre strange! La ĉefstabo opozicia klopodegas kondamni la „neproletan vortaron" — k la anoj deziras havi ĝin. La K-doj proponas interŝanĝe diversajn aĵojn, nur por akiri la vortaron. Kaj ambaŭ K-doj loĝas en — Sovetio...

F. S.

TRA NIA MOVADO

KRONIKO

Aŭstrio. La 14. junio okazis en *Steyr* jara renkontiĝo de l'supra-aŭstriaj Gek-doj, kiun partoprenis 95 personoj (kvankam la plej multaj K-doj estas senlaboraj). En la „Industriehalle" okazis festkunveno, kiun ĉeestis kiel gastoj la soc.dem.urbestro de Steyr, la distriktestro de l'soc.dem.partio, la estro de l'kleriga fako k liberpensul-reprezentanto. Krome venis 3 K-doj el Germanio k 1 el Budapesto. Post raportoj de la grupestroj K-do Haagen parolis pri organizaj problemoj. La kantunuiĝo de l'grupo Linz tre beligis la feston. (Laŭ „La Socialisto"). — **Germanio.** *Dresden.* La 15., 16., 22. k 23. de aŭg. aranĝis la loka grupo Dresden de Socialista Esperanto-Asocio por la germanlingvaj regionoj (SEA) kursgvidantan kurson en la kadro de du semajn-finkursoj en la naturamika hejmo Boxdorf apud Dresden. Partoprenis la kurson 45 Gek-doj. La instruado okazis en du partoj; por ĉiu parto la loka grupo Dresden disponigis gvidanton: I. Historio de esp-o, esp-organizoj, esp-literaturo, diversaj projektoj de artefarita lingvo, — gvidanto: K-do Eckert. II. Instruado laŭ la lernolibro de Hegewald — gvidanto: K-do Pechmann. La kurso tre bone sukcesis. El la fina diskuto pri la farita laboro dumkursa oni povis ekscii, ke la intereso pri tiaj aranĝoj estas tre granda. *Eco (13 477).* — En *Crimmitschaŭ k Jena* fondiĝis novaj SEA-grupoj. — Duonjara konferenco de LEA-distrikto Leipzig okazis de 29.—30. aŭg. en *Riesa.* 60 Gek-doj vizitis ĝin. Ankaŭ ĉeestis sovetia K-do *H. Frank* el *Voroneŝ*, kiu faris interesplenan paroladon pri lab. k kamparana korespondado peresp-a en Sovetio. El la tagordaj raportoj ni ĉerpas jenon: En la distrikto nun ekzistas 22 grupoj kun 383 membroj. Ĉiumonate aperas 6-paĝa distr. bulteno „RUĜA AKTIVISTO". Somere okazis kurso por kursgvidontoj en *Brandis.* — En la kadro de la konferenco ankaŭ funkciis ampleksa esp.ekspozicio. Dimanĉe antaŭtagmeze okazis propaganda kunvenego en plej granda urba kinejo. La programo enhavis muzikon, parolĥoron, paroladon de LEA-asociestro k prezenton de fama kontraŭmilita filmo „Sennomaj herooj". La kinejo estis plenplena. Ĉeestis mil personoj! Do, prave ni diru, ke la tuta aranĝo estis plensukcesa. Baldaŭ novaj kursoj malfermiĝos en la tuta distrikto. *(Krey, 5486.)*

Forgesu neniam noti la nomon de l'forsendinto!

Ni ofte invitis la poŝtistojn en nia urbo partopreni la kursojn de nia Lab.Esp.Grupo; ĝis nun sensukcese. Iun tagon mi estis vokata al la poŝtejo, ĉar alvenis letero kun adreso, kiun petis min deĉifri la poŝtestro. Mi vidis, ke urb- k landnomo estis ŝanĝitaj kun la nomo de l'ricevonto k de l'strato. Sed mankis por ĝin resendi la adreso de l'forsendinto! Estas letero el Anglio (Palmers Green) adresita al K-do Popoviĉ en urbo Lunzenaŭ (Mulde). K-do forsendinto aŭ ricevonto turnu sin tuj al la poŝtejo de tiu urbo. La poŝto turnis sin al mi kiel esp-isto por havi konsilon — do oni komencas atenti nin: sed esp. K-doj, neniam forgesu noti sur viaj leteroj la nomon de l'forsendinto.

Kramer (8453).

EKSTER NIA MOVADO.

En aŭgusto vojaĝa societo el 40 anglaj esp-istoj vizitis en Kolonjo (Köln) ekspozicion „La infano en la ŝtataro", kiu havis ankaŭ esp. fakon. Okaze de tio geknaboj el la popollernejo kantis esp-e k estis publike ekzamenataj pri sia esp-a scio per dialogo, en kiuj partoprenis alilandaj esp-istoj. Unu influhava ĉeestinto, urba lernej-konsilanto, promesis doni sian apogon al la plua disvastigo de esp-o en Kolonjo.

Praktika enciklopedio „Leksikono de l'vivo" (germanlingva) eldonata de la konata germ. „Eldonejo por kulturesplorado" (Verlag für Kulturforschung) publikigas en sia 3-a volumo esp. kurson riĉe ilustritan sur 24 grandformataj dukolore presataj paĝoj. Ĝin redaktas d-o Pfeffer.

Ĉ. 300 personoj ĉeestis la inaŭguron de Zamenhof-memorŝtono en Bad Reinerz (Germ. Silezio), kie Zamenhof dufoje restadis kiel bangasto.

Internacia Kongreso de Stenografio, okazinta en Parizo de 3-a ĝis 7-a de aŭg., havis en sia tagordo esp-on; tiel multaj raportantoj, ankaŭ neesp-istoj, citis ĝin en siaj paroloj. La kongreso akceptis deziresprimon, ke en la estonta unueca kongreso oni ekzamenu la utilon de esp-o kiel sola lingvo uzebla por la traduko de l'komunikoj aŭ paroladoj faritaj per iu nacia lingvo.

Por la instrujaro 1931/32 la programo de l'„Instituto Administracia k Ekonomia" en Krakovo enhavos *devigan* esp-instruon.

La 24-a Kongreso de l'Esp. Asocio de Norda Ameriko okazis de 1.—3. julio en Milŭoki (Milwaukee), Usono. El la raportoj de l'estraro estas notinde, ke la Asocio havas nun 544 membrojn, la gazeto „Amerika Esp-isto" 703 abonantojn; la Junulara Fako havas 477 anojn (al ĝi estas dediĉata aparta atento en la Asocio).

RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Esperanto in Schule und Lehrerschaft (Esp-o en lernejo k instruistaro). Flugfolio germanlingva. 8 paĝoj. Form. 22 × 31 cm. Eld. Esp.-Unuiĝo de Germ. Instruistoj (H. Schneller, Leipzig W 35, Rückmarsdorferstr. 1). Prezo: 1 ekz. 0,20 mk.g., 10 ekz. 1.50 mk., 50 ekz. 6 mk., 100 ekz. 10 mk.

Komunikoj por la Gazetaro de ITF (Internacia Transportlaborista Federacio). *Amsterdam,* Vondelstraat 61. Represo petata, prefere kun mencio de la deveno. Jara abono: 1.20 gd., 2 mk.g. aŭ egalvaloro.

7 n-oj, 84 dense presitaj (hektografitaj) paĝoj aperis jam de tiu ĉi esp-lingva gazetservo de ITF, kiu per tio serioze helpas al nia esp-a afero. Espereble la transportlab. K-doj scios eluzi tiun ĉi gazetservon por sia propagando. La sciigoj entenitaj estas nepre interesaj por la laboristoj de tiu kategorio. Ankaŭ priesp-an rubrikon trovos la propagandistoj en ĝi. Fakesprimoj uzitaj estas speciale klarigitaj en la fino de ĉiu n-o.

MEMORNOTO

Represis el „S-ul-o":

Volksstimme, Chemnitz, 15. 4., lernejoj en Jap. (338), la patriot. de l'kapit. (340); 30. 5., en okcid. nenio nova (342), represita de la soc. dem. taggazetoj en Köln k Kiel; 12. 8., el Ĉeĥoslov. (354).

Pri la SAT-Kongreso raportis:

Leipziger Volkszeitg., 20. 8., *Volkswacht,* Regensburg, 27. 8., *Népszava,* Budapest, 6. 8. (grava artik. pri SAT en la social-dem. ĉeforgano de Hung.), *Coburger Volksblatt,* 25. 8., *The Town Crier,* Birmingham, 21. 8., *Daily Worker,* London, 31. 8. (opozicia mensog-raporto); *Korresp. f. Deutsche Buchdrucker,* 19. 8., *Volksstimme,* Chemnitz, 31. 8.

Priesper. artik. k notojn enhavis:

Signalen, Stokh., 27. 8., *Le Réveil Ouvrier,* Nancy, 29. 8., *The Labour Woman,* Lond., sept. (rubr.), *The Norwalk-Artesia Times,* Norwalk (Kalif.), ekde 3. 6. ĉiusemajne, *Volksstimme,* Chemnitz, 13 notoj de marto ĝis aŭg.

NIA POŜTO

10 593. — Mi legis kun intereso vian artikolon, sed decidis tamen ne publikigi ĝin. Vi forgesis, ke SAT ne havas k ne povas havi socipolitikan programon k sekve vi maltrafe starigis la demandon. Ni povus publikigi artikolon, en kiu vi mem dirus: „en okazo de milito *mi* faros ĉi tion k tion." Pripensu la aferon k vi certe ekkomprenos la diferencon. — *E. L.*

KORESPONDADO

Unu enpreso, simpla trilinia anonceto kostas 0,80 mk g., ĉiu plia linio 0,50 mk. g. — Grandaj anoncoj kun kadro: po kv. cm. kostas 0,20 mk. g.

Vidvo (34 j. kun 7 j. filineto) deziras koresp. kun K-dino en aĝo de 28—35 j., foto dezirata. Adr.: G. W., postlagernd Planitz/Sa. — Resp. garantiata.

ENHAVO

	paĝo
Ĉu malsuperaj rasoj? Ne! Malsamaj civilizoj	395—396
Georgo Bernardo Ŝa (Shaw) pri Rusio	396—397
La fonto de senlaboreco	397—398
La klasbatalo tra la mondo	398—399
Pri la drako-festotago en Ĉinio	399
Diskutejo	399—400
Ajnŝtajn (Einstein) pri la problemo de l'paco	400—401
Por nia medito	401
Tra Esperantio	401—402

Abontarifo al Sennaciulo: Argentino, pes. 6; Aŭstrio, ŝil. 12; Belgio, belgoj 12; Brazilio, milrejs. 18; Britio, ŝil. 9; Bulgario, lev. 250; Ĉeĥoslovakio, kr. 60; Danio, kr. 10; Estonio, kr. 8; Finlando, mk. 80; Francio, fr. 40; Germanio, mk. 9; Hungario peng. 10; Italio, lir. 45; Japanio, jen. 5; Jugoslavio, din. 120; Latvio, lat. 10; Litovio, lid. 20; Nederlando, guld. 6; Norvegio, kr. 9; Polio, zlot. 15; Portugalio, esk. 40; Rumanio, lej 350; Sovetio, rubl. 4,50; Svedio, kr. 9; Svisio, fr. 12; Usono dol. 2,50. — **Ponumera prezo estas: 0,20 mk. g. = 0,25 fr. svis.** Ni ankaŭ akceptas 1/4-jaran abonon. **MONON ONI SENDU:** rekte al la Administranto de SAT, **Richard Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig-O-27 (Germanio).** poŝtĉek-konto 6835 aŭ pere de unu el la jenaj poŝtkontoj, ĉiuj je la nomo de R. Lerchner: Bruxelles, 227 848 — s'Gravenhage, 142 084 — Praha, 501 007 — Stockholm, 4268 — Warszawa, 191 335 — Wien-D, 137 725 — Zagreb, 40 040 — Kobenhavn, 14 938 — Zürich-VIII, 15 929. — La francianoj pagu al Sennacieca Asocio Tutmonda, 23 rue Boyer, Paris-XX, per la poŝtkonto 1234—22. — En landoj kie ni ne havas poŝtkontojn, oni pagu per **ŝtataj monbiletoj en registrita letero aŭ per poŝtmandato.**

Presejo: Oscar Wettig, Gelnhausen (Germanio)